

Direkte al racia lingva politiko:

## **Proponoj de la**

## **Nacia Komisiono pri lingvoj kaj Esperanto de la Franca Verda Partio**

Ekde ĉiam ludas la lingvaj demandoj decidan rolon en la konsistigo de popoloj kaj la konstruo de daŭro-kapablaj politikaj entoj. Eŭropo por pli-fortikigi sin kaj por partopreni en la nova mastrumado de la planedo, ne povos preterlasi la taskon difini koheran kaj efikan lingvan politikon.

Dubinde estas ke la ideologio, kiu regas en la Eŭropaj institucioj nuntempe, povus esti bazo de tia politiko. Fakte la oficiala doktrino pri multlingveco estas maltrafa je diversaj aspektoj.

- Ĝi baziĝas sur nerealisma konstato koncerne la vera rego-grado de fremdaj lingvoj fare de la Eŭropaj civitanoj. Ekzemple, oni uzas sondadojn en kiuj oni petas al la civitanoj ke ili sin mem taksu. Kelkaj studoj kiuj mezuris la realajn scipovojn de la civitanoj jam malkaŝis fendegon inter la mem-atribuitaj kompetentoj kaj la realaj.
- Ĝi faras projekciojn koncerne la estonteco de la lingvo-lernado kiuj baziĝas sur neniu serioza scienca studo kaj kiuj elvokas dubojn fare de multaj ĉi-kampaj fakuloj.
- Ĝi estas, plej ofte, elpensita de instancoj havantaj partikularajn interesojn pri la uzo kaj instruado de lingvoj kaj kiuj celas favori ĝian ekspansion, sen ĉiam klare starigi la demandon pri la fina celo de la lingva instruado.
- Ĝi konfuzas, per la sama termino "multlingvismo", la netuŝeblan rajton de lingvaj grupoj uzi siajn proprajn lingvojn kun la nerealisma kaj kontraŭ-libera devigo al ĉiu civitano ke li aŭ ŝi regu plurajn lingvojn,
- Kaj, super ĉio, ĝi ne starigas la kernan demandon, laŭ demokrata vidpunkto, kiu lingva rimedo pli kapablas ebligi al la plej multaj paroli je la plej alta nivelo.

Pli ĝenerale, oni estas devigita konstati ke tiu "multlingvisma" doktrino, ĝis nun neniel bremsis antaŭeniron de la tre privilegiita uzo de la Anglan, ĉu je la "alta" formo, ĉu en ĝia pli disvastigita formo de dialekto dediĉita al kampoj kiel turismo aŭ komerco. Kaj oni devas demandi sin ĉu tiu fenomeno estas dezirinda por Eŭropo aŭ por mondo kiun ni deziras mult-flanka.

Aliflanke, tiu situacio pli-favoranta la Anglan kreas en Eŭropo duoblan ne super-ireblan frakturon.

1. Inter lok-ŝangpovaj grupoj ĝenerale apartenantaj al la superaj klasoj kaj pli lok-fiksitaj homoj apartenantaj plej ofte al la malpli ekonomie favoritaj klasoj.

2. Inter la loĝantoj de landoj kie oni parolas lingvojn de la germana familio kaj landoj kie oni parolas lingvojn de aliaj familioj.

Tiaj malegalaĵoj kontraŭas la bazajn principojn de la Verduloj kiuj, ĉiu-foje ke estas realisme, agadas per taŭgaj rimedoj, por malgrandigi tiujn.

Ni rememorigas ke la Verduloj malakceptas kiajn ajn malŝparaĵojn, kaj ke je la momento kiam la limoj de la globa kreskado jam estas atingitaj en multaj kampoj, gravas ke publikaj politikoj estu direktitaj prioritare al la ekologia re-strukturado de la ekonomio kaj al la efika uzo de ĉiuj rimedoj cele al malgrandigo de nia ekologia piedpremo.

Pro tio la Eŭropa Verda Partio starigas la sekvantajn punktojn rilate al la lingva politiko.

- La rezultoj de la politikoj ĝis nun sekvitaj devas esti, en ĉiu lando de Eŭropa submetigitaj al serioza taksado, proporcie al la elspezoj efektivitaj. Tio necesas la rigora apliko de la nova Eŭropa Komuna Kadro pri Lingvoj, precipe koncerne per-ekzamena taksado.
- Eŭropo kaj la nacioj kiuj ĝin konsistigas devas doni ĉiujn ŝancojn al la eksperimenta programo "Lingvo Lanĉilo" nun disvolviĝanta en kelkaj lernejoj tra Eŭropa, kiu koncernas la uzo de Esperanto kiel propedeutika (lernado-enkondukan) ilo por la lernado de diversaj lingvoj. Estas konsiderinde ke Esperanto posedas Eŭropan leksikan vort-provizon sed posedas ankaŭ raciigitan gramatikon kaj vort-faradajn principojn, kiuj faciligas kaj ĝian lernadon kaj la asimiladon de gravaj lingvistikaj nocioj kiuj nune estas regitaj nur de la malplimultaj Eŭropaj gelernantoj, je la fino de iliaj devigitaj studoj. Tiu lingvistika bazo faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, laŭ la bezonoj kaj deziroj de ĉiu individuo.

Krome, Esperanto, estas, laŭ pli longa perspektivo, ebla solvo al la demandoj kiujn la publikaj potencoj daŭre rifuzas starigi al sin

<http://www.springboard2languages.org/home.htm>

<http://www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm>